



DJANGO



bildorakonto

Aŭtoro	Frans Haacken
Titolo	Django
Tradukis	Dorothea & Hans-Georg Kaiser kaj Frank Vohla de la klubo Karapaco en klubvesperoj laŭ la bildorakonto „Django de la Otto Maier eldonejo Ravensburg en Germanio.
Aranĝis	Frank Vohla Hans-Georg Kaiser
Finrevizio	je la 11-a de aŭgusto en la jaro 2016






Ĉe la rando de urbo staras cigana ĉaro.
La cigano Joêjo kun sia familio loĝas en ĝi.
Lia edzino nomiĝas Negros, kaj la granda filo nomiĝas
Jozefo. La hundo ne havas nomon.

Se ĝi venu, ili vokas simple: „Venu! Venu!“

Ĉeokaze ĝi eĉ venas.

La nuda knabeto sur la brako de la patrino nomiĝas


Django



Ciganoj ne ŝatas longatempe restadi en unu loko.
Ili migras per siaj ĉaroj tra la landoj.
Ne estas facile por ili:
Oni ofte faras malfacilaĵojn al ili.

Oni diras: „Ciganoj ŝtelas. Ciganoj pigras!“

Kaj tamen ili estas tre bonaj metiistoj. Neniu riparas potojn tiel bone kaj neniu plektas korbojn tiajn belajn kiel ciganoj. Multaj el ili, estas vere, ne povas legi kaj skribi, sed la plej multaj ludas muzikilon, ĉar multaj ciganoj estas tre muzikemaj.




La patro de Django ludas tre bone pianon.

Ĉiun vesperon li muzikas en kafejo.

La onklo ludas violonon.

Kaj ĉiun vesperon la malgranda Django staras ekstere
kaj aŭskultas. Muzikon li ŝatas pli ol ĉion.
Li havas nur unu deziron: ankaŭ li volas fariĝi
muzikisto.




Hodiaŭ Django havas sian naskiĝtagon.

La patrino vestis sin per dimanĉa robo, kaj la patro kondutas tiel mistere. Li provas kaŝi ion malantaŭ sia dorso: sian donacon por Django – gitaron!

Django brilas pro feliço.

Li apenaŭ povas kompreni tion. Nun ankaŭ li povas muziki.




Ĉiutage Django sidas dum horoj sur la ŝtuparo de la loĝoĉaro kaj ekzercas. Estas neniuj, kiu povus instrui la notlegadon al li. Ciganoj ne bezonas notojn. Ili ludas laŭ la aŭdosenso.

Django tuj rimarkas, se intervenas falsa sono. Tiukaze li elprovas tiom longe, ĝis la patro diras: „Bone tiel, knabo mia!“

Tiam Django ruĝiĝas je la oreloj pro fiero.

Sian gitaron li ne elmanigas. Li kunprenas ĝin eĉ vespere en la liton.




Kelkajn semajnojn Django elprovis kaj ekzercis.
Jen lia patro diras iutage: „Morgaŭ vi rajtos kuniri en la
kafejon. Tie ni ludos kune.“
„Antaŭ ciuj homoj, ĉu?“ demandas Django.

„Antaŭ ciuj homoj!“ diras lia patro.

Django estas skeptika. Ĉu ĉio iros glate? Li kun sia gitaro
supre sur la podio en la kafejo, antaŭ la multaj homoj!


Li estas tre ekscitita.

Django en tiu nokto ne dormas bone.



Tiam la granda tago alvenis. Django hodiaŭ lavis sin tre zorgeme. Siajn ungojn li brosis. Ankaŭ sian gitaron li poluris ĝis brilego. Tiam la tempo venis.

Django ludas kun la patro kaj la onklo en la kafejo!
La muziko tre plaĉas al la homoj. Post ĉiu danco ili
restadas sur la dancejo. Ili aplaŭdas kaj vokas: "Brave!
Ludu plu!" Django diras mallaŭte al si: „Dio mia, tio ja
funkcias!“
Kaj kiam finfine la patro metas manon sur lian kapon kaj
diras: „Bone tiel, knabo mia!“ li denove ruĝiĝas je la
oreloj pro fiero. Nun li do estas vera ciganmuzikisto!



Django fariĝis juna viro. Li edziĝis.


Lia edzino Amŝel povas fari el bunta papero tre belajn florojn. Tiujn ŝi ofertas en kafejoj, ŝi vendas ilin rapide, ĉar ili vere estas belaj.

Django ludas sian gitaron nun tiel bone, ke oni venas eĉ el malproksime por auskulti lin.

Lia muziko estas gaja kaj ĝojiga. La homoj baldaŭ fariĝas bonhumoraj, kiam ili aŭskultas lin.

Oni povas aĉeti jam eĉ sondiskojn kun lia muziko. Oni povas diri:


Django estas fama.



Estas malfrue en la nokto. Ĉiuj loĝoĉaroj estas malhelaj.
La ciganoj dormas. Django lace alvenas hejme. Li
ekbruligas kandelon en sia ĉaro, li volas enlitiĝi.


Jen okazas terura afero: La kandelo renversiĝas kaj falas en karbon plenan de paperfloroj. Ili brulas baldaŭ en helaj flamoj kaj flamiĝas eĉ la tuta lignoĉaro. Django kaj Amŝel rapide saltas eksteren – en la lasta momento ili ankoraŭ saviĝas.

La najbaroj alkuras.



Django kuŝas ekstere. Li estas grave vundita.
Lian tutan korpon kovras brulvundoj.
La najbaroj vokas la ambulancon. Tiu portas lin en la
hospitalon.

Tie, kie staris la loĝoĉaro de Django, jam ardas nur monto
el cindro.




La kuracistoj en la hospitalo faras ĉion, kion ili kapablas.
La brulvundoj saniĝas malrapide. Kiam Django forlasis la
hospitalon, li jam denove sufiĉe bonfartas.
Sed du fingroj de lia maldekstra mano rigidiĝis.

Kion faru gitaristo, se li povas uzi subite jam nur tri fingrojn de mano?

Aŭ li metas la gitaron en angulon aŭ li provas ludi per tri fingroj. Per kvin fingroj estas jam tre malfacile, - sed per tri fingroj?

Nu, Django provas tion.

Ofte la mano doloras tiom, ke li emas rezigni. Tiukaze li kunpremas la dentojn kaj provludas plu.



Django sukcesas!

Li ludas nun per siaj tri fingroj eĉ pli bone ol antaŭe. Kaj
lia muziko denove gajas.


Django nun perlaboras multe da mono.

Li havas grandan aŭtomobilon; ŝoforo en uniformo
veturigas lin. Inter la koncertoj li loĝas en multekostaj
hoteloj.

Sed ĉiam Django havas hejmsopiron al siaj homoj ekstere
en la ciganoĉaroj. Se la hejmsopiro tro grandiĝas, li
invitas la ciganojn al sia hotelĉambro.

Li ordonis starigi fornon en ĝin. Lia edzino kuiras
ciganajn manĝaĵojn.


Tio estas tiam preskaŭ kiel ĝusta cigana bivako.



Ankoraŭ multe pli agrable estas, se Django vizitas siajn homojn ekstere. Tiukaze la ŝoforo veturigas lin ĝis la kampadejo.

Tie la ciganoj lin akceptas kiel reĝon.

Li sidas tiam kun ili ĉe la bivakfajro. Ili rakontas kaj muzikas. Tie Django troviĝas plej volonte. La ŝoforo restadas ĉe la aŭtomobilo. Li timas, ke sia ŝofora uniformpantalono povus malpuriĝi.




Oni vendas la sondiskojn de Django milionope.
Li monde famiĝis. Django ne ludas sola.
Li trovis amikojn, kiuj estas grandaj muzikistoj, tiaj, kia
li. Ili mondfamiĝis kune.

Multajn horojn po tago ili sidas en sonstudioj.

Tio estas streĉa laboro.

Django veturas kun sia gitaro de urbo al urbo, de lando al lando.

Lia vivo estas tre peniga.




Kiam Django ludas en la koncertsalonoj, la homoj
eksaltas de la seĝoj kaj ĵetas la brakojn alten.

Ili vokas: „Brave, Django! Brave!“


Tiam la oreloj de Django eĉ nun plu ruĝigas pro fiero.

Kaj ĉe la ciganoj kaj muzikamantoj el la tuta mondo oni
nomas lin: „Django nia.“



Django fariĝis pli maljuna. Li diras nun ofte al siaj amikoj: „Mi ne scias, miaj fingroj ne plu tiel bone reagas. La ludado ofte streĉas min. Mi volas iom ripozi.“ Jen li iras sola al la rivero. Li serĉas al si kvietan lokon. Tie li sidiĝas kaj fiŝhokas.


Iutage Django endormiĝis ĉe la fiŝkaptado.
Ciganoj, kiuj preterpasas en ĉaroj, ekkonas Djangon. Ili
desaltas el la ĉaroj kaj kuras al li. Ili volas veki lin,
ili frapas lin sur ŝultron
kaj diras: „Hej - Django!“
Sed Django ne plu vekiĝas.



Kiam la gazetoj raportas, ke Django mortis, kunvenis homoj el la tuta mondo, inter ili multaj muzikistoj kaj tre multaj ciganoj. Ili tre malĝojis, ke Django, kiu disvolviĝis de malgranda ciganoknabo al la plej bona gitaristo de l' mondo, nun ne plu vivas.

Ĉe lia tombo ili ludis la muzikon, per kiu Django tiel ofte feliĉigis la homojn.

FINO



La vivo de Django Reinhard instigis la desegniston Frans Haacken, jen supre sur la foto, al sia lasta bildolibro.

Frans Haacken tre admiris tiun eksterordinaran ciganon, kiu naskiĝis en la jaro 1910 en Belgio kaj mortis en la jaro 1953 kiel prijubilata ĵazomuzikisto. Dum sia infaneco Django migris kun sia familio tra partoj de Eŭropo.

Li ludis violonon, banĵon kaj gitaron. En 1928 kripliĝis lia maldekstra mano post brulo en cigana kampadejo.

Diligente kaj plena de energio li sukcesis plu ludi kaj fariĝi unu el la plej elstaraj ĵazmuzikistoj en la tridekaj jaroj de la antaŭa centjaro. Django Reinhardt fariĝis la unua grava ĵazmuzikisto en Eŭropo. Liaj sondiskaj registradoj en la fama "*Hot Club de France*" en Parizo estas neforgeseblaj dokumentoj de l' ĵazmuziko.

Kiu havas iam okazon aŭdi lian muzikon en tre bona kvalito, ekzemple en ciganklubo en Parizo aŭ en la naskiĝdomo de Django, tute certe estas fascinita de tiu muziko, kiu esprimas universon el sentoj. Laŭdire li verkis tri mil kantojn, kaj ĉiu el ili estas alia, ĉiu estas originala juvelo, kiu pruvas, ke ni ĉiuj sen tiu ciganmuziko estus malpli riĉaj je sentoj, je ritmo, je fiero, je humuro, je nehipokrita ĝojo kaj je aŭtentika malĝojo.